La adjektivoj ĉiam sekvas la substantivojn, kiujn ili kvalifikas; ili akordiĝas kun la koncerna substantivo, nur se povus esti miskompreno okaze de neakordiĝo: yel gudik³⁷: *la bonne année*: la bona jaro, yels gudik, *les bonnes années*: la bonaj jaroj. Yeli³⁸ gudik!, *bonne année!*: Bonan Jaron! Buk gletik³⁹ *le grand livre*: la granda libro. Buks gletik, *les grands livres*: la grandaj libroj.

f. Sesa principo: ne ekzistas artikolo

Ni tuj menciis, ke volapük ne posedas artikolon. Se oni volas indiki, ke substantivo estas en nedifina formo, oni devas aldoni post ĝi la vorton sembal, kiu estas kunmeto de la prefikso sem, *certain*: iu, ia, iu ajn, ia ajn, kaj de la nombro bal, unu. Buk sembal signifas do *un certain livre*: iu ajn libro.

³³ ü prononciĝas kiel la germana *ü*, kaj kiel en la francaj *cuve*, *tube*.

³⁴ am: sufikso por abstraktaj nomoj.

³⁵ av: sufikso por sciencaj nomoj.

³⁶ el: sufikso por homaj nomoj.

³⁷ gud, *la bonté*: la boneco, la bono; gudik, *bon*, *bonne*: bona.

³⁸ i estas la marko de akuzativo.

³⁹ glet, *grandeur*, *taille*, *dimension*: grandeco, grandio, amplekso, dimensio.

g. Sepa principo: Nomoj de homoj

En la vorto pedipedelas ni retrovas la sufikson el, kiun ni jam rimarkis: bukel, *auteur*: aŭtoro; bukamel comptable: librotenisto. Ĝi donas nomojn de homoj, iom kiel la sufikso ul de esperanto. Kaj vi tuj atentu, ke volapük posedas tri tiajn sufiksojn: el, al kaj ül. El karakterizas la personon, kiu simple okupiĝas pri la aĵo esprimita de la vortelemento, al akcentas la superecon de la koncernulo kaj ül akcentas la malsuperecon, la primitivecon.

En la du paĝoj reproduktitaj ni rimarkas la vortojn dokel, kademal, löpatidel⁴⁰, spodal, tedel, volapükatidel kaj vomül, kiuj signifas:

Dokel, *docteur*: doktoro⁴¹

Kademal, *académicien*: akademiano⁴²

Löpatidel, *recteur*: rektoro⁴³

Spodal, *correspondant*: korespondanto⁴⁴

Tedel, *commerçant*: komercisto⁴⁵

Volapükatidel, *professeur de volapük*: instruisto de volapük⁴⁶

Vomül, *mademoiselle*: fraŭlino⁴⁷. Fakte vomül signifas *femme primitive*, *femme vierge*: virino primitiva, virga, praa.

Tiu lasta vorto vomül respiegulas tipan karakterizaĵon vortfaradan de volapük. Tial ni forlasu momenton la vortfaradajn principojn por prezenti tiun leksikan problemon.

h. Leksika problemo: Nekohera analizo de la fundamentaj baz-ideoj

Tiuj kelkaj ekzemploj sufiĉas por komprenigi kelkajn vortfaradajn karakterizaĵojn de volapük. La vortelementoj ofte memorigas naciajn vortojn, kio faciligas ilian lernadon fare de poliglotoj okcidentlingvaj.

Sed la vortelementoj havas tre abstraktan signifon iom neŭtralan, kaj nur pere de sufiksoj ili akiras konkretan sencon. Ne ekzistas, kiel en esperanto vortelementoj de diversaj gramatikaj tendencoj: substantivemaj, adjektivemaj, verbemaj, ktp. Tiurilate volapük estas tipe artefarita lingvo kaj pro tio ĝi daŭre donas impreson de nenatureco, kontraŭe al esperanto.

Kaj pro la nepreciza signifo de la sufiksoj mem, la senco de la persufikse akiritaj vortoj estas ofte tute arbitra, tre nebula. Tiuj signifoj ofte dependas de la kreaĵ kapricoj pli malpli arbitraj de Schleyer mem, kio vekis multajn kritikojn pli kaj pli akrajn.

⁴⁰ ö prononciĝas kiel la germana ö, kaj kiel en la franca *feu*.

⁴¹ dok, *doctorat*: doktoreco.

⁴² kadem, *académie*: akademio.

⁴³ Löp, *partie supérieure*, *sommet*: supera parto, supro. Tid, *enseignement*, *instruction*: instruado. Tidel, *maître*, *instituteur*, *enseignant*, *professeur*: instruisto, instruanto.

⁴⁴ spod, *correspondance*: korespondado.

⁴⁵ ted, *commerce*, *négoce*: komerco, negoco.

⁴⁶ vol, *monde*, *univers*: mondo, universo. Pük, *langue*: lingvo. Pükatidel, *professeur de langue*: lingvoinstruisto. Volapük langue universelle, *langue mondiale*: universala lingvo, tutmonda lingvo.

⁴⁷ vom, *femme*: virino.

La fraŭlinoj ekzemple ne tre ŝatis esti nomataj vomŭls pro tio, ke la sufikso ŭl estas pejorativa. La uzo de la etiganta sufikso il ankaŭ montriĝis nekontentiga, ĉar vomil signifas *petite femme*: virineto. Tio estis fakte germanismo: *die Frau, das Fraülein*, kiun Kerckhoffs rifuzis, el tio lia prefero por la sufikso ŭl ankaŭ nekontentiga.

La vortelementoj en esperanto estas fundamentaj baz-ideoj. Tio ne samas en volapük. En esperanto tial ni havas la distingon inter la baz-ideoj *sinjoro* kaj *fraŭlo*. Kaj el tiuj baz-ideoj helpe de la sufikso *in* povas kvazaŭ aŭtomate kreiĝi la vortoj *sinjorino* kaj *fraŭlino*. En volapük tio ne eblas. Ekzistas la vortelementoj söl, *monsieur*, sinjoro; läd, *madame*: sinjorino. Kaj por la nocio *fraŭlo* ne ekzistas baza vortelemento.

Fraŭlo diriĝas nepematel en volapük. Tio estas aglutino de la elementoj ne/p/e/mat/el. Ne, *préfixe de négation*: prefikso por la negacio; p, *on forme le passif des verbes en préfixant un p*: formiĝas la pasivo de la verboj per la prefiksado de p. e, *marque préfixale du passé indéfini*: prefiksa marko de la nefinita pasinteco. mat, *mariage*: geedziĝo, el, *suffixe de nom de personne*: sufikso por nomo de persono. Nepematel do signifas: *needziĝinto, fraŭlo*.

En volapük *needziĝintino* aŭ *fraŭlino* diriĝas ofnepematel. Of *sert à former le féminin des substantifs et des verbes*: uziĝas por formi la inan formon de la nomoj kaj de la verboj. Sed tiu uzo ne estas ĝeneraligebla kiel en esperanto. Kiel ni vidis, por *sinjorino* oni ne diras ofsöl, sed läd.

Fakte por la nocio de needziĝinta virino devus ekzisti baza vortelemento, ĉar semantike ni troviĝas antaŭ baz-ideo. Sed por la ina formo de *sinjoro* la ekzisto de nova baz-ideo semantike ne estas necesa. Schleyer, kontraŭe al Zamenhof, ne klare konsciis pri tiu semantika neceso de baz-ideoj en aglutina lingvo.

Lia elekto de bazaj vortelementoj estas ĉefe influata de la germana lingvo. ĉar en lia lingvo ekzistas la vortoj *Herr* kaj *Frau*, el kies lasta kreiĝas la vorto *Fräulein*, tiel ankaŭ estas en volapük. Tial en la komenco volapük malpli ŝokis la eŭropanojn, ol esperanto, ĉar semantike ĝi estas tipe eŭropeca. Kontraŭe, semantike, esperanto estas multe malpli eŭropeca, ĉar ĝi emancipiĝis de la eŭropecaj vortfaradaj uzoj. Kaj ĝuste pere de la libro *Yelabuk Pedipedelas*, kiu en sia bibliografia parto atentigis la legantaron pri la supereco de esperanto kontraŭ volapük, multaj diplomitaj volapükistoj transiris al esperanto.

i. Pri la etimo de la volapükaj vortelementoj

Por doni kelkajn ekzemplojn pri etimoj ni rimarku, ke yel⁴⁸ fontas el la germana *Jahr* aŭ la angla *year*; buk tuj pensigas al *Buch, book, bouquin*; vom memorigas la anglan *woman*, gud la anglan *good* kaj la germanan *gut*.

La vortelementoj de volapük estas ĝenerale unusilabaj, maksimume dusilabaj, kiel diped, kiu memorigas la sufiĉe internacian vorton *diplom*.

Pro gramatikaj kaŭzoj, la vortelementoj nek komenciĝu, nek finiĝu per vokaloj, kies rolo en tiuj pozicioj estas gramatika. Tiurilate volapük tre similas al pluraj aglutinaj lingvoj.

⁴⁸ La konsonanto **r** ĝenerale prononciĝas **l** en volapük.

j. Participa verbsistemo simila al tiu de esperanto

Sed ni alvenu al la vorto pedipedelas, kiun ni disigu tiel: p/e/diped/el/a/s. Ni jam scias, ke s estas la marko de la pluralo, ke a estas la marko de la genitivo, ke el estas sufikso por formi nomojn de uloj. La vortaro indikas al ni, ke diped signifas *diplôme*: diplomo, kaj ke p/e kiel ni jam vidis estas verba prefikso por marki la pasivan formon en pasinto nefinita. Dipedel estas do ulo, kiu diplomas, do diplomanto, kaj pedipedel estas ulo, kiu ricevis diplomon, diplomigis, diplomito. Vi verŝajne tuj rimarkis, ke la aktivan formon mi tradukis per la nuna aŭ ĉiama verba formo: *diplomanto*, kaj ke por la pasiva formo mi donis la tradukon en la pasinta formo: *diplomito*. Tio plene ĝustas, ĉar volapük, kiel esperanto, povas diri tiujn vortojn en la estonta, nuna kaj pasinta formoj:

<u>odipedel</u>	<u>dipomonto</u>	<u>podipedel</u>	<u>dipomoto</u>
<u>(a)dipedel</u> ⁴⁹	<u>dipomanto</u>	<u>padipedel</u>	<u>dipomato</u>
<u>edipedel</u>	<u>dipominto</u>	<u>pedipedel</u>	<u>dipomito</u>

Kaj nun ni traduku tiun titolon: yelabuk pedipedelas, *annuaire des diplômés*: jarlibro de la diplomitoj.

k. Aliaj similaĵoj kun esperanto

En volapük oni ankaŭ povus diri: yelabuk de pedipedels. La genitivo esprimiĝas do per la finaĵo a, kiel ni jam diris, aŭ per la prepozicio de. Ĝi povas esprimiĝi sinteze per a aŭ analize per la prepozicio de, kiel en esperanto: la doma pordo, la pordo doma aŭ la pordo de la domo.

La diferenco estas, ke la a-marko ne konserviĝas en esperanto por la vortkunmetoj kontraŭe al volapük: la *dompordo* aŭ la *domopordo*. La kaŭzo estas, ke en esperanto la marko a estas samtempe la marko de la adjektivo kaj de la genitivo, dum en volapük la marko de la adjektivo estas ik, kaj tiu de la genitivo a.

Kelkaj opinias, ke tiaj paralelismoj, kun pli drasta ĝeneraligo en esperanto, ol en volapük, atestas, ke Zamenhof estis influita de la Schleyer'a lingvo. Povas esti.

Ni bezonis sufiĉe longan momenton por alveni al la traduko de tiu mistera titolo. Mi mem, kiam mi komencis deĉifri tiun libron, mi bezonis pli ol unu semajno de sufiĉe streĉa laboro por fine alveni al tiu kontentiga traduko. Sed dankal tiu studado pri la vortfarada principaro de volapük, mi povis pli kaj pli facile traduki tiujn misterajn volapükaĵoj. Sen komentarioj mi nun liveras al vi la tradukon de la tuta titolpaĝo:

France:

Annuaire des diplômés contenant:

1^{èremment} des remarques sur les travaux de l'assemblée des académiciens, sur l'obtention des diplômes et sur les concours internationaux;

2^{èmement} une liste complète des ouvrages concernant le volapük et les langues universelles;

3^{èmement} une liste des diplômés et des maisons de commerce correspondant en volapük

⁴⁹ La prefikso a ĝenerale ne diriĝas en la nuna formo aktiva.

*par le professeur Kerckhoffs, directeur de l'académie
deuxième année: (1888-1889).*

Esperante:

Jarlibro de la diplomitoj enhavanta:

- 1-e rimarkojn pri la laboroj de la akademiano, pri la diplomiĝo kaj pri la internaciaj konkursoj;
- 2-e liston kompletan de la verkoj pri volapük kaj pri la lingvoj universalaj;
- 3-e liston de la diplomitoj kaj de la komercaj entreprenoj korespondantaj volapüke.

fare de profesoro Kerckhoffs, direktoro de la akademio
dua jaro (1888-1889).

1. Oka principo: La kazoj en volapük

En la esperanto-traduko mi akuzativigis la vortojn rimarkoj kaj listo, ĉar en volapük tiuj substantivoj ĝuste havas la akuzativan markon: notedis⁵⁰, lisedi⁵¹.

En volapük ekzistas ununura deklinacio por ĉiuj substantivoj. Jen tri ekzemploj:

Singulare gi estas:

nominative:	<u>buk</u>	le livre	la libro
genitive:	<u>buka</u> aŭ <u>de buk</u>	du livre	libra aŭ de la libro
dative	<u>buke</u> aŭ <u>al buk</u>	au livre	al la libro
akuzative	<u>buki</u>	le livre	la libron

Kaj plurale:

nominative	<u>buks</u>	les livres	la libroj
genitive	<u>bukas</u> aŭ <u>de buks</u>	des livres	libra aŭ de la libroj
dative	<u>bukes</u> aŭ <u>al buks</u>	aux livres	al la libroj
akuzative	<u>bukis</u>	les livres	la librojn

<u>tidel</u>		la instruisto
<u>tidela</u>	aŭ <u>de tidel</u>	instruista
		aŭ de la instruisto

⁵⁰ not, *avis*, *nouvelle*: noto, novaĵo. Ed estas sufikso por formi konkretan vorton, do noted, *remarque*, *observation*: rimarko, observaĵo.

⁵¹ La vorto lised donas la impreson havi la saman sufikson ed, sed fakte ĝi estas dusilaba vortelemanto signifanta *liste*, *catalogue*: listo, katalogo. Same estas kun la vortoelemanto diped, *diplôme*: diplomo.

<u>tidele</u> <u>tideli</u>	aŭ <u>al tidel</u>	al la instruisto la instruiston
<u>tidels</u> <u>tidelas</u>	aŭ <u>de tidels</u>	la instruistoj instruista aŭ de la instruistoj
<u>tideles</u> <u>tidelis</u>	aŭ <u>al tidels</u>	al la instruistoj la instruistojn
<u>dom</u> <u>doma</u> <u>domes</u>	aŭ <u>de dom</u> aŭ <u>al dom</u>	la domo doma aŭ de la domo dome(n) aŭ al la domo
<u>domi</u>		la domon
<u>doms</u> <u>domas</u> <u>domes</u>	aŭ <u>de doms</u> aŭ <u>al doms</u>	la domoj doma aŭ de la domoj dome(n) aŭ al la domoj
<u>domis</u>		la domojn

Ni konstatas grandan paralelismon kaj samecon por la prepozicioj de kaj al. Kelkaj opinias, ke tio pruvas influon de volapük al esperanto, kio eblas. Sed oni ankaŭ povas konsideri, ke ambaŭ lingvoj ĉerpas el la sama etima fonto.

m. Blefams

Antaŭ ol diri kelkajn vortojn pri la konjugacio en volapük, ni donu la tradukon de la blefams⁵²: *abréviations*: mallongigoj.

Jen la traduko de la listo de la mallongigoj:

- b. buk, *le livre*: libro.
- b.z.v. bür zenodik volapüka, *bureau volapükiste central*: centra volapüka oficejo⁵³:
- dl. dokel, *docteur*: doktoro⁵⁴:
- f. flan, *page*: paĝo.
- fel. feleigol, *veuillez comparer*: bonvolu kompari⁵⁵:
- fr. fran, *un franc (monnaie)*: franko.
- K. kademal, *l'académicien*, akademiano.
- k. kapit, *chapitre*: ĉapitro.

⁵² blef, *brièvement*: mallongeco. Am estas sufikso indikanta agon, kiu ĝenerale korespondas al la finaĵo -ation de la franca lingvo. Blefam, *abréviation*: mallongigo. Ni jam renkontis la saman sufikson en buk, *livre*, libro, bukam, *tenue de livres*: libroteno.

⁵³ zenod, *milieu, centre*: mezo, centro; zenodik, *central*: centra.

⁵⁴ dok, *doctorat*: doktoreco; dokel, *docteur*: doktoro.

⁵⁵ feleig, *comparaison*: komparo; feleigön, *comparer*: kompari; ol, *tu, vous (pour une personne)*: vi (singulare); feleigol, *tu compares*: vi komparas; ös marque du souhait, il faut que...: deziresprimo, bonvolu...; feleigols, *veuille comparer, veuillez comparer*: bonvolu kompari.

- L. löpatidel, *recteur, instituteur en chef*: rektoro, ĉefinstruisto.
 ld läd⁵⁶, dame, madame: sinjorino.
 log. logolös, *veuillez voir*: bonvolu vidi⁵⁷
 m. mak, *le mark (monnaie)*: marko (mono).
 n. nüm, *numéro*: numero.
 plofed (dip. Schley.), *professeur de volapük ayant reçu le diplôme par le canal de Schleyer*: profesoro de volapük diplomita de Schleyer.
 plofed (dip. flent.), *professeur de volapük ayant reçu le diplôme français*: profesoro de volapük ricevinta la diplomon francan.
 pübam (= segivot), *édition, publication (concret)*: eldonaĵo, publikaĵo⁵⁸.
 peb. pepüböl, *ayant été publié*: publikigita⁵⁹
 s. söl, *monsieur*: sinjoro.
 spodal (dip. löst.), *correspondant ayant le diplôme autrichien*; korespondanto posedanta la diplomon aŭstran.
 spodal (dip. flent.) *correspondant ayant le diplôme français*: korespondanto posedanta la diplomon francan.
 t. tan, *volume (livre)*: volumo (libro).
 T. tedel, *commerçant*: komercisto.
 V. volapükatidel, *professeur de volapük*: profesoro de volapük.
 Vt. volapükatidel löst., *professeur de volapük ayant le diplôme autrichien*: profesoro de volapük posedanta la diplomon aŭstran.
 Vül. vomül, *mademoiselle*: fraŭlino.

Tiu paĝo de la mallongigoj finiĝas per rimarko, kiun ni tradukas:

Remarque.- Je n'ai pas employé les néologismes du dictionnaire de l'Inventeur, s'ils n'ont pas encore été examinés par l'ensemble des académiciens. Les mots de personnes que j'utilise sont illogiques.

Rimarko: Mi ne uzis la neologismojn de la vortaro de la Inventinto⁶⁰, kiuj ne estis ekzamenitaj de la akademianaro. La nomoj personaj, kiujn mi uzas, estas nelogikaj.

Sekvas ekzemploj pri la logikaj formoj kaj pri ties mallongigoj, kiuj ebligas konklude diri kelkajn vortojn pri la land- kaj gent-nomoj en volapük:

Kiel ĉiuj vortelementoj, ankaŭ la landnomoj estas substantive abstraktaj, kaj helpe de la ĉiam deviga sufikso än formiĝas la landnomoj. Per la aldono de ik formiĝas la koncernaj adjektivoj. Por formi la gentnomojn oni aldonas la sufikson el, kaj denove oni povas formi adjektivojn per la sufikso ik.

La vortelementoj deut, rus, bodug, ned, löst kaj flent do akiras realan signifon, nur kiam ili ricevas la necesajn sufiksojn:

⁵⁶ ä prononcigxas kiel la germana *ä* kaj kiel la esperanta *jes*. La opozicio inter la vokaloj e kaj ä estas grave signifa.

⁵⁷ log, *œil*: okulo; logön, *voir*: vidi; logol, *tu vois, vous voyez*; vi vidas; logolös, *veuillez voir*: bonvolu vidi.

⁵⁸ püb, *édition, publication (action)*: eldono, publikigo; pübam, *édition, publication (concret)*: eldonaĵo, publikaĵo.

⁵⁹ püböl, *éditant*: eldonanta, publikiganta; e, *passé indéfini*: nefinita paseo; epüböl, *ayant édité*: eldoninta, publikiginta; p, *forme passive*: pasiva formo; pepüböl, *édité*: eldonita, publikigita.

⁶⁰ Schleyer ricevis la titolon Datual. Datuy, *invention*: invento; datual, *le grand inventeur*: la granda inventisto.

<u>Deutän</u> <u>Deutänik</u>	Allemagne	Germanujo ⁶¹ Germanuja
<u>Rusän</u> <u>Rusänik</u>	Russie	Rusujo Rusuja
<u>Bodugän</u> <u>Bodugänik</u>	Portugal	Portugalujo Portugaluja
<u>Nedän</u> <u>Nedänik</u>	Hollande	Nederlando ⁶² Nederlanda
<u>Löstän</u> <u>Löstänik</u>	Autriche	Aŭstrujo Aŭstruja
<u>Flentän</u> <u>Flentänik</u>	France	Francujo Francuja
<u>Deutänel</u> <u>Deutänelik</u>		germano germana
<u>Rusänel</u> <u>Rusänelik</u>		ruso rusa
<u>Bodugänel</u> <u>Bodugänelik</u>		portugalo portugala
<u>Nedänel</u> <u>Nedänelik</u>		nederlandano nederlandana
<u>Löstänel</u> <u>Löstänelik</u>		aŭstro aŭstra
<u>Flentänel</u> <u>Flentänelik</u>		franco franca
<u>Deutänapüke</u> <u>Rusänapüke</u> <u>Bodugänapüke</u>		germanlingve ruslingve portugallingve
<u>Nedänapüke</u>		nederlandlingve
<u>Flentänapüke</u>		franclingve

⁶¹ Ni uzas la formon Germanujo prefere al Germanio pro tio, ke en 1889 la sufikso *io* ne ekzistis.

⁶² Ni memorigas, ke en 1887 Zamenhof tendencis aldoni la sufikson *ujo* por ĉiuj landnomoj, kaj ke nur poste li ekkonsciis, ke oni ne diru *Holandujo*, sed *Holando*. Tio indikas tutcerte volapükan influon. Ni ne forgesu, ke Zamenhof uzis la jarlibron *Yelabuk Pedipedelas* por dissendi siajn unuan kaj duan librojn.

Fakte Kerckhoffs per sia noto proponas simpligitan sistemon, kiun li nomas nelogika, ĉar laŭ la Schleyer'a uzo oni devas adicii la sufiksojn.

<u>Deutän</u>	Germanujo		
<u>Deutel</u>	germano	anstataŭ	<u>deutänel</u>
<u>Deutik</u>	germana	anstataŭ	<u>deutänik</u> aŭ <u>deutänelik</u>
<u>Deutapüke</u>	germane	anstataŭ	<u>deutänapüke</u>

Tiuj simpligoj anoncas la reformismon de la *Kadem Volapüka* (Akademio Volapüka), kontraŭ la Schleyer'a logiko.

maire avec exercices et vocabulaires; in-16, f. 136. Paris, Henri Jouve, 1886.

Noted. — Lautel epübom otüpo samadis su tiadabled kelas patuvos *première édition e quatorzième édition.*

Menet. — Grammaire élémentaire de la langue Universelle; in-16, p. 4^{id}, f. 22. Paris, Bonhoure, 1886.

Verheggen. — Nal Bino. Projet d'une langue Universelle, simple, facile et harmonieuse; in-8, f. 37. Liège, Thiriart, 1886.

St. de Max (Streif). — Le Bopal, Essai de langue Universelle. Grammaire, textes et vocabulaire; in-24, f. 54. Paris, Baudry, 1886.

Dormoy. — Le langage international conventionnel, in tmp. *Le Moniteur de l'Exposition*, 1887.

— Le Balta, in tmp. *Le Moniteur de l'Exposition*, 1887.

D^r Esperanto (Zamenhof). — Langue Internationale. Préface et manuel complet; in-16, f. 48. Varsovie, Gebethner et Wolff, 1887.

Noted. — Vobuk at pepübom poso in püks deutik, neljik, polänik e rusänik.

— Dua libro de l'lingvo internacia; in-16, f. 50. Vorsovio, Kelter, 1888.

Noted. — Log. La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems, fa *Leopold Einstein*. Nürnberg, Stein, 1888.

Moser. — Zur Universal-Sprache, Kritische Studie über Volapük und Pasingua. Berlin, 1887.

— Zur Geschichte der Weltsprache; in-8, f. 70. Neuwied, Heuser, 1888.

Paĝo 35: aperas bibliografia mencio pri la nova lingvo de D-ro Zamenhof.

Por paroli pri alia logiko, ni rimarku, ke esperantaj vortoj kiel *svisano*, *rusano* kaj *Brazilio*, kiujn forĝas nekleraj esperantistoj, pli korespondas al la volapüka logiko, ol al la esperanta. En tiu logiko la

vortelementoj *svis*, *rus*, kaj *brazil* estas abstrakte sensignifaj, kiel en volapük la vortelementoj jveiz⁶³, rus, basil, el kiuj oni formas laŭ la Schleyer'a logiko la vortojn jveizänel, rusänel kaj Basilän aŭ laŭ la Kerckhoffs'a la vortojn jveizel, rusel kaj Basilän. Pli ol unu esperantisto estas senkonscie volapükisto!

3. Esplorindaj tekstoj

Konklude ni revenu al la enhavo mem de la jarlibro de la diplomitoj. La unuan parton de tiu *Yelabuk Pedipedelas* (p. 1-11), kiu estas titolita *Kadem Volapüka* (Akademio Volapüka) mi komplete francigis kaj tiel mi konstatis, ke en 1889 por la volapükistoj ekzistis multaj solvotaj demandoj gramatikaj, leksikaj kaj vortfaradaj.

Eĉ Schleyer mem submetas al la juĝo de la akademio kelkajn tiajn problemojn. Sed poste li ne konsentis kun la akademiaj respondoj kaj tio okazigis skismon detruigan por la volapüka movado.

La sekva ĉapitro *Steifalam Bevünetik* (p. 12-15) raportas pri internaciaj konkursoj kaj listigas la premiitojn.

Tre grava ĉapitro titolita *Lised Lefulnik Vobukas dö püks valemik, sesumii volapük, pepüböl sis yelatum XVIIId* (p. 16-85) donas tre kompletan bibliografion de ĉiuj eblaj verkoj interlingvistikaj aperintaj ĝis la jaro 1889. Sur la paĝoj 34 kaj 35 ĝi jam registras ĉiujn verkojn de Zamenhof kaj de Leopold Einstein. Tio pruvas la scian nivelon de la laboro de Kerckhoffs. Tre objekte li raportas ne nur pri la sukcesoj de volapük, sed ankaŭ pri la konkurencaj projektoj kaj pri la kritikoj kontraŭ volapük.

Fine la lasta parto (p. 86-176) titolita *Tefü Dagetam Dipedas kaj Lised Pedipedelas* klarigas unue la nivelon de la diplomoj proponitaj kaj donas poste la liston de ĉiuj diplomitoj en la mondo laŭ la kontinentoj. Atenta trastudo de tiu nomaro alportos veran geografion volapükan en la naskiĝtempo de esperanto.

Tutcerte dum venonta aranĝo mi reparolos pri la verko *Yelabuk Pedipedelas* ĝuste por iom detale raportiti pri la enhavo mem de tiuj instruciĝaj ĉapitroj. Ili estas analizindaj.

⁶³ **j** prononciĝas kiel la esperanta **ŝ**; **z** prononciĝas kiel la esperanta **c**.

TRANSNACIA REDAKTADO EN PLANLINGVO

Perla Martinelli⁶⁴

Estimataj gekolegoj, sinjorinoj kaj sinjoroj,
Permesu al mi, antaŭ ĉio, necesan precizigon.

Paroli pri revuo en planlingvo kaj paroli pri revuo en esperanto, kion mi celas, estas temoj profunde malsamaj, ĉar esperanto jam ne plu povas esti ĉirkaŭbarita en la simpla rolo de interlingvo. Jam de longe pri ĝi povas okupiĝi socilingvistiko kaj psikolingvistiko, pli ol simpla interlingvistiko, ĉar, male al aliaj planlingvoj, ĝi estas la lingvo de efektiva parolkomunumo, kiu aktive partoprenas en ĉiaj disvolvoprocezoj, kiel okazas por kiu ajn etnolingvo. Tio diferencigas nin de aliaj periodaĵoj en planlingvoj, tiom forte ke pli facilus trovi funkcia similecon inter du gazetoj, ni diru, en Occidental kaj latino ol en Occidental kaj esperanto. La komparo, cetere, montru mian absolutan respekton al aliaj planlingvoj: ne temas ĉi tie pli meritklasifikoj, sed pri kategorioj.

Aliflanke, revuo redaktata en esperanto havas nur partajn analogiojn kun tiuj en etnolingvo. Oni pensus unuavice al certa simileco kun revuoj en minoraj, precipe diasporaj lingvoj, kiel la jida: sed ankaŭ ĉi tie ne ekzistas identeco funkcia.

Ni konsideru unuavice la fakton, ke ekzistas diversaj tipoj de periodaĵoj en esperanto: krom enorma kvanto da variaj bultenoj, ni havas asociajn organojn (ekzemple Esperanton de UEA kaj Sennaciulon), kiuj vivas el propra asocia merkato, kaj ekster ĝi estas apenaŭ legataj: eleksterajn revuojn, subvenciatajn de ŝtatoj (kiel EPĈ) aŭ de fortaj grupoj, kiuj simple aldonas, en sia buĝeto, la esperantan eldonon al pluraj alilingvaj; sendependajn revuojn internaciajn, kiuj siavice dividiĝas en laŭtemaj fakoj, kaj efektive similas al ordinaraj nacilingvaj produktoj, ĉar ili ne estas subvenciataj sed dependas de la favoro de la legantoj. Por daŭri ili devas strebi al kvalito, pli ol la aliaj kaj eĉ pli ol la nacilingvaj fratoj, ĉar ĉi-lastaj ricevas fortan enspezon el reklamanoncoj, ĉe ni finance sensignifaj.

★ ★ ★

Por fari konkretan ekzemplon de redaktado en transnacia planlingvo, mi parolos al vi hodiaŭ pri mia sperto ĉe periodaĵo apartenanta al la laste aludita kategorio, tiu de la sendependaj revuoj internaciaj. Malgraŭ sia titolo, *Literatura Foiro*, ĝi okupiĝas pri sufiĉe larĝa kultura tereno, en kaj ekster Esperantio, kaj eniris guste en 1994 la dudek-kvinan vivojaron, seninterrompe, malgraŭ ĉiuj spertitaj malfacilaĵoj. Aparteninte al ĝiaj abonantoj ekde la unua momento, mi, post sufiĉe longa kunlaboro en diversaj branĉoj de la redakcio, transprenis la ĉefredaktorecon en 1980. Jen kial, surbaze de efektiva sperto, mi nun provos skizi en kio konsistas la unikeco de redaktado en esperanto kompare kun nacilingva laboro similtima.

⁶⁴ Perla Martinelli, ĉefredaktoro de *Literatura Foiro*, BP 232, CH-6830 Chiasso-1 (Svislando). (adreso ne plu valida).
Hodiaŭa adreso: Kultura Centro Esperantista, BP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando)

Mi jam aludis al la fakto, ke revuo kiel la nia ricevas absolute neniun financon subtenon, kio kompreneble povas esti rigardata kiel bela stimulo por nia elturniĝemo, sed evidente bremsas kelkajn eblecojn. Ekzemple, la belaj koloraj fotoj kiuj longe estis la ĉefa allogo de EPĈ restas por ni fora revo: feliĉe, la daŭra fidelo de niaj abonantoj ebligis ekzemple transiron al bonega paperkvalito, kio jam kongruas kun nia stilo.

Do, ni lasu la financon demandon ekster diskuto, konstatinte ke, ankaŭ pro la fakto ke ni ĉiuj laboras sen honorario, la abonkotizoj sufiĉas por kovri la kostojn. Jes, la bonvola laboro povus esti konsiderata jam unu el la plej signifaj diverĝoj inter nia mikrosocia kaj la sama makrosocia engaĝo, sed tio en Esperantio ne estas malofta kazo. Pli malofta estas la strebo labori profesinivele, kvankam bonvole.

Nu, post atenta pripensado, ĉiam surbaze de mia propra sperto, mi alvenis al la konkludo ke la ĉefaj apartaĵoj de transnacia redaktado, kia tiu de Literatura Foiro, estas tri. Mi indikos ilin laŭ inversa ordo de graveco: temas kompreneble pri mia persona takso.

1. Redakciaj rilatoj preskaŭ nur korespondaj;
2. Nefacila strebo al komuna kulturtavolo;
3. Superpezo de la lingvo.

Pri la unua punkto, sufiĉas malmultaj vortoj. Mi aludis, ke revuo en nia lingvo povus havi analogiojn kun tiuj en minoraj aŭ diasporaj lingvoj. Tamen, laŭ mia scio similaj makrosociaj periodaĵoj vivas ĉirkaŭ efektiva nukleo, kvankam ili ricevas ankaŭ artikolojn de eksteraj kunlaborantoj. Male, mi povas efektive kunsidi nur kun kelkaj el miaj redaktoroj, kaj neniam en pleno. La plejparto de la kontaktoj okazas letere, aŭ dum vojaĝoj. Tio certe ne faciligas mian laboron, kaj havas sekvojn, pri kiuj mi parolos en la tria punkto.

La dua koncepto estas multe pli nuanca, ĉar ĝi ne aludas al fakto, sed al abstraktaĵo, kvankam efektiva.

Nacilingva kultura revuo scias, kun preskaŭ absoluta certeco, kion ĝi povas diri, kaj kiel. La malfacilo ne kuŝas en tio, sed en la kapablo trovi kaj prezenti ion pli novan kaj interesan ol la konkurenco. Fakte, ĝi sin adresas al publiko sufiĉe homogena, ĉar la komuna nacieco komprenigas la aludojn, kaj la kulturnivelo estas jam selektita dekomence: temas pri preciza merkata niĉo.

En samtipa esperanto-revuo, la celata publiko tute ne estas homogena, precipe pro la geografiaj, kaj sekve kulturaj, diferencoj. Konsentite, ke ekzistas certa internacia kulturnivelo, laŭ kiu oni povas elekti kun certa konfido temojn kaj aludojn, sed la nuntempa teknologiema instruado jam eliminis parton de la tutmonda humanismo, kiu forte apogiĝis sur la eŭropa tradicio. La konscio pri tio kaŭzas kelkfoje dilemon: ĉu riski nekomprenon, aŭ tro platiĝi, malaltigi la nivelon? Mi fine decidis, kompreneble interkonsente kun miaj kunlaborantoj, pri meza vojo tamen pli proksima al la plialta sojlo. Nome, se io estas vere tre faka aŭ elita, mi klopodas redakcie interveni, tamen kiel plej malpeze. Sed bona verkisto, kiel bona oratoro, scias ke ofte sufiĉas alimaniere ripeto de la koncepto aŭ de la vorto, por refreŝigi aŭ klarigi nocion, ne donante pedagogian impreson: *tian* stilon mi petas de novaj kunlaborantoj, se necese. Glosojn mi enmetas ege malvolonte, ĉar la nia ne estas scienca, sed beletra revuo, kaj tio havas siajn regulojn. Cetere, ŝajnas al mi nature ke esperantistoj, kiuj laŭdifine estas kleraj aŭ kleriĝemaj, posedas enciklopediojn, kie ili povas eventuale trovi la bezonatajn informojn. Kaj pri tio, kio pli strikte koncernas nian propran kulturon, historian kaj lingvan, mi ne estas cedema: la leganto *devas* koni bazajn faktojn, kaj se ne, li/ŝi havas bonan stimulon por dokumentiĝi. Ankaŭ tiu ĉi estas la tasko de

kultura revuo: veki scivolon, atentigi pri io nekonata, malfermi padon. Ne eblas ĉion diri, kiel ne eblas ĉion scii: sed serĉado estas ekscita ludo.

Kaj jen, parolante pri niveloj, ni alvenis al la tria punkto, al la vera, granda diferenco inter verda kaj makrosocia periodaĵo: la lingvo.

Por multaj esperantistoj, la lingvo estas ankoraŭ nun la ĉefa, la vera kaj sole interesa temo. Religiaj revuoj parolas pri Dio: ĉe ni, multaj volus paroli nur pri La Lingvo.

Sed kiu lingvo? Ĉar estas klare ke, samkiel pri Dio, pri nia lingvo ĉiuj havas malsaman percepton, kiu dependas ne nur de geopolitikaj faktoroj, sed ankaŭ de persona gusto, edukiĝo scienca aŭ humanisma, ofteco en la utiligo, kaj multe de la sinkrona segmento: nome, kia estis la lingvo en la momento, kiam la persono ĝin lernis. Tio restas grava bazo, eventuale nekonscia, kiel la familia lingvaĵo restas ĉe ni ĉiuj, eĉ se eventuale ni evoluas poste tre malsimile.

Tiu ĉi fenomeno ne aperas en kulturrevuoj nacilingvaj, kie maksimume oni diskutas pri la *stilo* de verkisto, kaj nur se ĝi estas vere speciala. En Esperantio oni ankoraŭ tre volonte diskutas pri gramatikaĵoj, eĉ pri interpunkcio, majuskloj kaj minuskloj. Ioman similecon tiurilate ni povas trovi en kelkaj periodaĵoj de minoritataj lingvoj, sed ne praktike ĉie, kiel ĉe ni. Niaj kleruloj kelkfoje vere troigas, abunde anatemante ne tiujn, kiuj havas aliajn ideojn, sed tiujn, kiuj la samajn sentojn esprimas per iom alia strukturo.

Esperanto, kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, spertas sinkronajn kaj diakronajn fenomenojn, tial mi sentas utopiaj kaj finfine reakciaj la pretendojn daŭre reveni al “tiel diris Zamenhof”, des pli ke Zamenhof de tempo al tempo kontraŭdiris sin mem - ja la lingvo ankoraŭ ne perfekte stabiliĝis - kaj precipe substrekis, ke la parolantaro evoluigos la lingvon *ĝin uzante*, kio entenas la nocion, kiom ajn limigitan, de modifo.

Kaj fakte, la tempo ne pasis nur por la naciaj idiomoj: la kutimoj ĉie ŝanĝiĝis, ne laste pro du mondmilitoj, kaj la parola kaj skriba manieroj adaptiĝis al la novaj cirkonstancoj, por paŭsi la novajn konceptojn. La rigida diverĝo inter parolata kaj skribata lingvo preskaŭ malaperis en kelkaj grandaj areoj, kaj mildiĝis en aliaj, malgraŭ pli fortaj bremsoj: vidu ekzemple Francion, kie oni aprezas nuntempe verkistojn kiel Guy des Cars (pseŭdonime *Sanantonio*), ŝoke harhirtigaj por la kultantoj de klasika beletro.

Niaj verkistoj pli timide serĉis propran vojon, ĝuste pro la la aludita kvazaŭsankteco daŭre atribuata al nia lingvo, kiel tia: kulto al la litero, pli ol la spirito. Kaj, speciale ĉe la poetoj, forta konservativismo: kelkaj ankoraŭ opinias ke sen fiksjaj formoj, kaj precipe sen rimoj, ne povas ekzisti vera poezio, ĉar tion diris Grabowski kaj Kalocsay.

Aliflanke kelkaj, ribeleme klopodante trabati novajn padojn, anstataŭ rigardi pli atente ĉirkaŭen por profiti la mirindan fekundecon de la jam floranta ĝardeno, kredis ke nur la leksiko povas proponi taŭgan kreskon. Jen denove eraro, kaŭzata de finvenkisma iluzio: la mondo nin agnoskos, kiam ni povos ĉion, sed absolute ĉion, tre precize traduki. Lingvistoj, kaj eĉ pragmataj tradukistoj, scias ke tio maleblas en kiu ajn lingvo.

Ĉe kiu flanko situas *Literatura Foiro* rilate al pure lingva demando? Ni simple respektas la lingvouzon de niaj redaktoroj, sed principe nia ŝato iras al klasikaj modeloj, eventuale adaptitaj al pli supra,

malpeza stilo. Nia referenco – ne eviteble devas ekzisti referenco - estas PIV, sed en kazo de diverĝo inter ties preskribo kaj la efektiva lingvouzo ni preferas agnoski ĉi lastan.

Unu el la tiklaj punktoj, por mia redaktado, estas ke *Literatura Foiro* ne prezentas nur beletron, sed entenas grandan esean parton, kaj la du kampojn oni ne povas trakti egalmaniere. Tio speguliĝas unuavice ĉe la artikol-selekto, kie nepre mi devas havi malsimilajn kriteriojn. Temas fakte pri, ni diru, arto pura kaj arto aplikita. En la pure arta parto, ekzemple poezio, mi ĝenerale ne intervenas, mi nur akceptas aŭ malakceptas. Se tamen mi havas sugeston, mi skribas al la aŭtoro, kiu konsentas aŭ kontraŭproponas, ĉiel havas la lastan vorton.

Por la cetero, mia interveno estas pli aŭ malpli peza laŭ la artikolistoj, ĉar kelkfoje venas artikoloj tre interesaj, sed ĵurnalisme (aŭ estetike) netrinkeblaj. Povas temi pri nova kontribuanto, sed eĉ pli konata kaj aprezata kunlaboranto: tempopremo, ne entuziasma komplezemo al preciza peto de la ĉefredaktoro aŭ aliaj faktoroj povas foje malaltigi la nivelon. Mia tasko de ĉefredaktoro estas tiam savi la enhavon, valorigante ĝin per decida, eventuale drasta, interveno. Estas en ordo, ke poste la merito iras ne al mi sed al la aŭtoro: al mi gravas ke la revuo estu ĝenerale bonkvalita, forme kaj enhave, je profito de la legantoj.

Mia persona opinio, certe ne aparte originala, estas ke en beletro la freŝeco, la avangardeco de verko ne dependas de la maleblo ĝin legi facile pro abundo de reformoj. Vortoj havas propran pezon ne kiel tiaj, sed kiel parto de forma esprimo: kiel gemoj en juvelo, ili devas servi la belecon de la tuto: kaj el la harmonio de ĉefverko ili mem akiras novan brilon, antaŭe ne rimarkitan. Tial, laŭ mi ne havas sencon, en beletro, apriorie decidi pri la uzota kvanto da leksemoj: laŭ la temo unuavice, poste laŭ la propra stilo, aŭtoro libere utiligu la propraĵojn de nia idiomo, vastegan aŭ sobran vortaron. Ridetigas min la naivo de tiuj samideanoj, kiuj pesas arton laŭ vortara vasteco: kompreneble ĝi necesas, sed oni ne faru el beletraĵo vitrinojn por sia klereco. Neniu malestimos vin, se vi ne substrekas en ĉiu linio ke vi parkeris la tutan PIV-on, plus aliajn pli-malpli fantaziajn “suplementojn”.

Gravas ke, kiam ekzistas la neceso, vi uzu la taŭgan vorton, eventuale eĉ raran, sed ĝustan en tiu momento, en tiu kunteksto. En plena libero, sed ankaŭ en plena respekto pri esperanto. Temas pri lingvo, ne plu pri lingvoprojekto, jam de longe. Tial, samkiel uzante la propran aŭ lernitan idiomon oni strikte aplikas ties regulojn, kiom ajn malglataj ili estu, neniu rajtas klopodi renversojn en esperanto, sub preteksto de plibonigo. Ekzistas parolkomunumo, al kiu ni ŝuldas respekton, ĉar sen ĝi la lingvo estus restinta unu el la sennombraj elcerbaĵoj kabinetaj. Cetere, ni memoru al kio portis la eble bonvolaj kaj ofte interesaj plibonigoj de Ido: tiu krizo serioze endanĝerigis ne nur la vivon de esperanto, sed la koncepton mem de planlingva uzo.

Perfekta lingvo ne povas ekzisti, do ni utiligu kun amo la jam genian donacon de Zamenhof kiel ni utiligas nian propran lingvon, kun atento al la gravaĵoj kaj elasteco en la cetero. Ni flugu iom pli alte ol komoj kaj majuskloj, la ĉieloj vastas se ni celas la sunon.

EDMOND PRIVAT: KIAL, KIAM, KIEN, KIEL

Tomasz Chmielik⁶⁵

Pasas jam kvin jaroj, post la 8^a Internacia Literatura Forumo, okazinta aŭguste de 1989 en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La prelegoj de Tomasz Chmielik, Françoise , Bonnie Fonseca, Claude Gacond, Perla Martinelli, Herbert Mayer, Giorgio Silfer kaj Eugène de Zilah pritraktis multfacete la fenomenon de Edmond Privat. Enkadre de la Forumo malfermiĝis la Jubilea ekspozicio, kiu plene prezentis trezorojn el la arĥivo Privata. Kantis Jan Stanislaw Skorupski kun sia trupeto. Li kantis kompreneble poeziaĵojn de Privat, por kiuj li komponis muzikon. Estis vere sukcesa aranĝo, kiu altiris kelkdekon da esperantistoj el dekelke da landoj.

Tiu ĉi Forumo estis pinto de la pri-Privataj solenaĵoj. Prologo estis konferenco, kiun aranĝis aprile polaj esperantistoj el Lublino. Gastprelegis Claude Gacond, kiu vizitis Lublinon kune kun sia edzino. En la Muzeo de Historio de Urbo Lublino oni malfermis ekspozicion, kiu prezentis esperantistan vivon en Lublino de 1888 ĝis la eksplodo de la 2^a mondmilito. Rimarkindis tiu parto de la ekspozicio, kie oni prezentis unikajn dokumentojn pri la vizito de Privat al Lublino (1915), kiam li estis survoje de Varsovio al Lvovo. La nomitajn dokumentojn havigis fotokopie la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Precipe kortuŝa por la svisaj gastoj estis vojaĝo al Zamoŝĉo laŭ la sama vojo, kiun antaŭ okdek jaroj sekvis nia pioniro.

Postrikolto de la Privata Jaro estis konferenco, kiun aranĝis novembre Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kun pri-Privata ekspozicio en Hofburgo. Prelegis Tomasz Chmielik, Claude Gacond kaj Herbert Mayer.

Ĉiuj tri aranĝoj, kiujn mi partoprenis persone postlasis en mi senton de nesateco, malgraŭ ke oni finfine rompis tiun silenton, kiu etendiĝis nekompreneble super la vivo kaj verko de Edmond Privat.

Vizitinte en somero de 1990 denove la Urban Bibliotekon en La Chaux-de-Fonds mi trovis la celon por miaj esploroj. Claude Gacond elprenis el ie kelkdek kovertegojn, kiuj entenis miksite franclingvajn artikolojn de Privat, publikigitajn en la jaroj 1916-1962. Unue mi ordigis ĉiujn ĉi artikolojn laŭ jaroj kaj revuoj. Poste mi agrafis ilin al paperfolioj kun ĝustaj indikoj dataj kaj enskatoligis. Sekvis fotokopiado. Tiel ekestis du kolektoj. Kolekto de originalaĵoj, kiuj restas metitaj en skatolojn kaj kolekto de fotokopiaĵoj bele binditaj. Ordigante tiujn ĉi artikolojn mi rimarkis, ke multaj mankas. Surloke mi povis konsulti jarkolektojn de tri revuoj, kun kiuj kunlaboris Privat: *La Sentinelle*, *Coopération* kaj *L'Essor*.

Ankoraŭ tiam ne venis al mi en la kapon ideo pretigi la artikolaron de Edmond Privat al eldono.

Mi rehejmiĝis, kaptis min ĉiutagaj okupoj, premegis min devoj lernejoj. Sed la semo, kiun ĵetis Claude,

⁶⁵ Tomasz Chmielik, ul. Jarzebinowa 3/30, PL-21- 040 Swidnik (Pollando)

ekĝermis.

Reveninte al La Chaux-de-Fonds venontjare - kiel kutime - dum miaj somerferioj, mi havis jam la ideon, kiu koncernis ne nur artikolaron de Privat, sed la tutan verkon. Paŝeto al efektivigo de tiu ĉi ideo montriĝis la traduka kurso, kiun mi gvidis. Partoprenis ĝin Juanita Turbillon kaj Thierry Flachon. Juanita esperantigis libreton pri la religia sinteno de Edmond Privat *Liberté doctrinale et sincérité* (Libero doktrina kaj sincero). Thierry ektradukis fervore *Le Chancelier décapité* (La kanceliero senkapigita). Tio konvinkis min, ke oni devas havigi al tiuj ĉi faroj ian kadron organizan, ian planon.

Sed ni iom revenu al pasintaĵoj. Post la Varsovia Kongreso (1887) mi kaj Pawel Wimmer el Varsovio volis fari ion valoran por Esperanto. Mi transprenis redaktadon de Pola Esperantisto. Sed nelonge daŭris tio. Redaktinte tri numerojn monografiajn mi devis forlasi la redaktadon, kiun transprenis Pawel. Pene kaj baraktante kun monmanko li redaktis sekvajn numerojn de *Pola Esperantisto*. Baldaŭ li rezignis. Ofte mi estis vizitanta lin en Varsovio kaj ĝuste dum tiuj interparoloj kun Pawel naskiĝis la ideo pri la propra, sendependa revuo. Sed tio kostegis. Ni aĉetis du komputorojn kaj malgrandan fotokopiilon. Ni konscie elektis tian eldonmetodon, ĉar ni sciis, ke ni tute ne povas pagi al la eldonejo. La minimuma kvanto, pri kiu diskutis ĉiuj eldonistoj, estis 1000 ekzempleroj. Iom konante la merkaton, ni ambaŭ sciis, ke tiom da ekzempleroj vendiĝos dum dekoj da jaroj. Ni elektis do konscie la fotokopiadon, kiu malgraŭ sufiĉe grandaj kostoj permesis ĉiam denove produkti aron da ekzempleroj laŭ venantaj mendoj. Mi trovis baldaŭ bindiston, kiu kunlaboras kun *Libro-Mondo*, ĉar tian nomon ni donis al nia multobligejeto, ĝis la nuna tago.

Aperis la unua numero de *La Epoko*, kiu estis socikulturpolitika revuo. Per *La Epoko* ni celis prezenti situacion en Orienta Eŭropo post la disfalo de komunismo. Ni intencis aperigi multoblige ne la revuon pri Esperanto, sed en Esperanto. Kun ĉiu numero *La Epoko* fariĝis pli kaj pli dika. La tria volumo estis preskaŭ 300-paŝa. Iom post iom ni fariĝis sklavoj de la kvaronjara ciklo. En 1991 ni decidis, ke *La Epoko* ne aperos regule. Ĉiujare estos 6 volumoj, kiujn konsistigos multaj kajeroj. Tiuj ĉi kajeroj aperos tuj, poste kiam oni finredaktos ilin. Tiel okazas ĝis la nuna tago.

En 1992 mi disiĝis kun Pawel. Li komencis labori en la redakcio de la konata pola revuo prikomputora *Enter*. Mi do devis transpreni la kompostadon, horojn mi pasigis starante ĉe la fotokopiilo kaj poste mi veturigis ĉiujn fotokopiaĵojn al la bindisto. Kiam ili estas binditaj mi dissendis ilin. Tiel estas ĝis hodiaŭ.

En *Libro-Mondo* mi komencis multoblige ankaŭ Privataĵojn. Aperis *Libero doktrina kaj sincero* kaj reeldoniĝis *Interpopola konduto*. Baldaŭ sekvos *La kanceliero senkapigita* kaj *La Pologne sous la rafale / La Pologne attend* (Pollando sub ŝtormo / Pollando atendas), ambaŭ en traduko de Thierry Flachon.

Tiamaniere mi venis al la komenco de la nova vojo. Kune kun Claude mi pripensis eldonplanon pri ĉiuj artikoloj de Edmond Privat. Ni dividis ilin en dumonatajn (versio franclingva) kaj unumonatajn (versio esperanta) kajerojn. Ili aperos kajere laŭ jaroj. Komence ni redaktos la franclingvan eldonon, kaj poste ni starigos du teamojn: tradukan kaj sciencan. Unu zorgos pri esperantigo de ĉiuj artikoloj, kaj la alia prinotos kaj prikomentos ilin el la historia vidpunkto kaj prilaboros indeksojn personajn kaj temajn. Ni planas fini la franclingvan eldonon aŭtune de 1995.

La alia grava tasko estas esperantigo de franclingvaj verkoj de Privat. Tion jam komencis Thierry Flachon. Mi volas aperigi ankaŭ manuskriptojn de Privat, por ke ili povu servi al profundaj pritekstaj

esploroj en la estonteco.

Dum tri jaroj mi faris mililojn da fotokopioj. Per tiuj ĉi fotokopioj mi volas refari la arĥivon Privatan en Pollando. La ĉefa kaŭzo estas, ke ne ĉiuj havas la ŝancon veturi al La Chaux-de-Fonds kaj resti tie dum semajnoj por esplori (kun granda helpo de Claude Gacond kaj Tazio Carlevaro mi havas tiun ĉi privilegion de 1986). La fotokopiojn mi ordigas laŭ kronologio. Estos ankaŭ ordigo laŭ temoj.

Pasintjare mi komencis interparoli kun la direktorino de la Urba Biblioteko en Svidniko (urbo en sudorienta parto de Pollando, kie mi loĝas). La interparoloj montriĝis sukcesaj kaj jam aŭtune ĉi-jare oni organizos en la biblioteko fakon Esperantan. Tiu ĉi fako entenos fotokopiojn el la arĥivo Privata, ĉiujn eldonaĵojn de Libro-Mondo kaj kolektojn de Esperantaj libroj, revuoj, gazetoj, bultenoj. Ni volas specialiĝi. La Svidnika Biblioteko dokumentos kaj esploros historion de Esperanta literaturo (originala kaj tradukita) kaj historion de esperantistaj ideoj. Ni kolektos kaj dokumentos ĉion, kio koncernas Esperanto-movadon en Pollando, Estonio, Latvio, Litovio, Bjelorusio, Rusio, Ukrainio, Slovakio, Ĉeĥio, Moldavio, Rumanio, Bulgario, Makedonio, Albanio, Serbio, Bosnio, Kroatio, Slovenio kaj Hungario. Oficiala malfermo de la Esperanto-fako en la Urba Biblioteko de Svidniko okazos en 1995, komence de julio, dum la unua Eŭropa Translanda Esperanto-Semajno, kiu pritraktos du temojn Edmond Privat kaj Orienta Eŭropo kaj Kulturo de polaj judoj. Okazos ankaŭ kunveno de esperantistoj el Orienta Eŭropo, dum kiu oni preparolos la nunan staton de Esperanto-movado en tiuj ĉi landoj post la disfalo de komunismo. Ankaŭ dum ETES ni solene lanĉos agadon de la fondumo Yvonne kaj Edmond Privat.

Estas nova tasko por Libro-Mondo, kiu multobligos verkojn originalajn kaj tradukitajn de Edmond Privat sub formo de ĉiam kompletigota verkaro de Edmond Privat (ni celas per ĝi tion, kion efektivigis Ludovikito pri la verkaro de Zamenhof. Jam baldaŭ lavangos kajeroj kun artikoloj, al kiuj aldoniĝos de tempo al tempo tradukitaj verkoj.

Koncerne al ĉiam kompletigota verkaro de e. privat naskiĝis la ideo pri programo 2003 (tiun ĉi nomon devenigas la jaro de esperantisteco de Edmond Privat. Ni planas, ke programo daŭros ĝis 2003. Ĝia ĉefa celo estas diskonigi la verkon de Edmond Privat tra la mondo Esperantista per eldonaĵoj, konferencoj, seminarioj, kolokvoj, filmoj ks. Oficiale la programo "2003" estos lanĉita, kaj la programo celas:

1. Eldoni plenan verkaron de Edmond Privat.
2. Aranĝi aron da konferencoj, dum kiuj oni pritraktos artikolaron de Edmond Privat: ekz. pri Francio, pri Anglio, pri Usono, pri Germanio, pri skandinavaj landoj, pri slavaj landoj, pri landoj de Norda Afriko, pri landoj de la nigra Afriko, pri Sudafriko, pri Ĉinio, pri Hindio kaj Pakistano, pri landoj de Sudorienta Azio, pri Ligo de Nacioj, pri Unuiĝintaj Nacioj, pri religia kaj rasa diskriminacio, pri socialismo, pri emancipiĝo de virinoj, pri svisa kaj internacia kooperativaj movadoj, pri senarmigo, pri kolektiva sekureco, pri internaciaj organizaĵoj, pri internacia civila helpservo, pri laboristaj sindikatoj ktp. Tiaj konferencoj povus okazi aŭ en la koncernataj landoj aŭ en urboj, kie havas sidejon la nomitaj organizaĵoj, kun subteno kaj aŭspicio de instancoj de tiuj landoj kaj organizaĵoj.
3. Aranĝi la 3^{an} Konferencon Pedagogian en La Chaux-de-Fonds, kiun antaŭigus aro da kolokvoj kaj seminarioj. Per tio ni celus kunordigi instruadon de Esperanto, enkonduki novajn instrumentojn, trejni instruistaron, verkigi modernajn lernolibrojn.

Lanĉi jaron de Gandhi en 1998, diskonigante agadon de Edmond Privat por Hindujo kaj ties amikecon kun Mahatma, eldonante antologion de liaj artikoloj kaj liajn verkojn pri Hindio, aranĝante aron da konferencoj en Hindio, Pakistano, Nepalo, Bangladeŝo kaj Srilanko, kiuj celus plivigligon de Esperanto-movado en tiuj ĉi landoj.

Ĉiujn ĉi agadojn oni konkludus dum la Jubilea Forumo, kiu okazus en 2003 en La Chaux-de-Fonds, en la Urba Biblioteko.

Mi esperas, ke per tiu komunikaĵo mi respondis al la demandoj, ligitaj kun Privatologio: kial, kiam, kien? Restas ankoraŭ unu demando: kiel? Sed la respondo al ĝi dependas nur de bonvolemo, kunhelpemo kaj subteno de tiuj, kiuj sentas sin adeptoj de Edmond Privat.

17.4.1994

HISPANOIDOJ: INTER SKEMISMO KAJ NATURALISMO

D-ro Giorgio Silfer⁶⁶

La disertacio por mia unua doktoriĝo fontis el kompromiso inter mia firma intenco pritrakti interlingvistikon kaj la same firma neceso dediĉi ĝin al mia specialiĝa lingvo, la hispana.

Kvankam doktoriĝo pri modernaj lingvoj en Italio implicas plejofte literaturan temon, mi povis tiel okupiĝi nur pri interlingvistiko. La titolo de la disertacio fakte estis: *La kastilia kiel bazo kaj rimedo por interlingva planado*. Temas do pri hispanoidoj, aŭ pri la interlingvoj, tio estas la planlingvoj celantaj internacian komunikadon, inventitaj sur hispana bazo.

Tiu ĉi fenomeno ne estas tiel ampleksa, kiel la latinoida aŭ kiel tiu bazita sur la angla aŭ sur la franca. Sed la esploroj kondukis al la malkovro de trioble pli vasta sortimento ol mi supozis.

Antaŭ ol pritrakti tiun ĉi sortimenton, necesis prezenti, almenaŭ skize, interlingvistikon mem. Tio donis la okazon kunigi en du ĉapitroj detalan terminologion pri la fako: nenio speciale nova estis dirita, kompare kun la terminoj jam uzataj ĉe itallingvaj interlingvistoj; sed unuafoje en itala universitata disertacio prezentiĝis vasta gamo de fakterminoj, kio por la koncerna jaro (1981) estis ankoraŭ novaĵo.

La elektita esplorkampo kondukis rekte al naturalismo, kaj specife al la tipo neregula / homogena, pro la ekskluziveco de la kastilia bazo, aŭ almenaŭ ĝia absoluta supereco en la konsiderataj lingvoprojektoj.

La diversaj lingvoprojektoj estis analizitaj laŭ tri rubrikaj: historio, tipologio kaj vortaro. Laŭ la progreso de la analizado, per komparado formiĝas ankaŭ juĝoj pri la unuopaj projektoj; juĝoj laŭ kriterioj el kiuj elstaras la konsekvenceco.

★ ★ ★

La unua hispanoido registrita en la historio de interlingvistiko estas *Nuove Roman* de Johannes Puchner, publikigita unuafoje en 1897.

Puchner sin proponas kontraste al la malsufiĉa natureco de Volapük kaj Esperanto, kun kurioza kritiko: la unua estus tro arbitra, la dua tro genia. Tiu ĉi kritiko pri Esperanto estis cetere sugestita de Liptay, kies verko *Langue catholique* (1890-92) havis grandan influon ĉe la eko de naturalismo.

Puchner mem ne eskapas la riskon de arbitreco: lia projekto, startinte kiel sintezo el la latinidaj lingvoj, reduktiĝas je kompromiso inter la itala kaj la kastilia, kun tipologia kaj leksika preferoj por ĉi tiu.

⁶⁶ D-ro Giorgio Silfer, Kultura Centro Esperantista, BP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando)

Same arbitraj ŝajnas la solvoj proponitaj de Cárdenas, aŭtoro de *Hom-idyomo*, publikigita unuafoje en Vieno, en 1921.

Cárdenas komencas per reformado de Esperanto; sed lia “esperantido” fakte estas nenio alia ol la apliko de la strukturo de Esperanto al la kastilia leksiko. Tial lia projekto ŝvebas inter skemismo kaj naturalismo, kun personaj solvoj kiuj igas la tuton kelkfoje tre originala. Valoras mencii nur unu ekzemplon: la Esperanta prefikso ge- estas transprenita por indiki ambaŭ seksojn, sed ĝi povas ricevi la pluralon - ge-patros estas *gepatroj* (unu paro), sed ges-patros estas pli ol unu paro da gepatroj.

Post Aŭstrio (kie aktivis Puchner kaj Cárdenas) Meksiko prezentas la aktivecon de ekstravaganca italo: Aldo Lavagnini el Romo, konata precipe kie okultisto, migris al Meksiko en la 30-aj jaroj, sed jam en 1923-25 li aperigis la unuajn provojn de projekto, kiun li kompletigos en 1937 kaj 1956, sub la nomo *Mondi Lingua*.

Lavagnini startas per novlatinoidoj, sub la rekta influo de Giuseppe Peano, aŭtoro de *Latino sine flexione*; kaj fine li donas al sia projekto pli kaj pli da hispanaj trajtoj. Malgraŭ tio, Lavagnini ne rezignas plene je skemismo, ĉiam strebante inter du principoj: natureco kaj simpleco (aŭ: *organeco*). Lia antaŭmilita polemiko kontraŭ Esperanto pro malsufiĉa natureco fariĝas lia postmilita polemiko kontraŭ Interlingua de Gode, pro ĝia *lack of organicity*.

